promeso tion fari. Dume, ni vidas la fikondiĉojn en kiuj vivas la mizeruloj. Mi ne volas insisti ĉi tie pri tiuj bildoj, kiujn vi povas vidi ĉiutage pertelevide. En la mondo estas nutraĵoj por ĉiuj, mankas la volo ilin distribui. Iam mi aŭdis al sinjorino diri, "devas esti almozuloj, ĉar tiamaniere mi povas doni al ili almozon kaj mi gajnos la ĉielon". Se ni ankoraŭ troviĝas en tiu epoko aŭ situacio, mi jam kompatas la malriĉulojn, ĉefe tiujn, kiuj loĝas en tiuj landoj, kie ili dependas de la volo de aliaj personoj. La solidareco simple estas kaŝi la fiagojn de personoj kaj registaroj. Nur kiam la homo havos siadispone ĉion necesan por vivi ni suriros la vojon de paco kaj kunvivado. Intertempe ni estu solidaraj, kun la espero, ke ni ne falu en tiu situacio. Ĉar ankaŭ en tiuj ĉi riĉaj landoj la mizero frapas multajn pordojn kaj eniras hejmen kaj restadas. La solidareco estas alvoko por plej bona distribuado de la riĉeco, sed ĉi tio esta grava kialo en nia socio, kie unika celo estas akapari kiel eble plej multe, senkonsidere al la situacio en kiu troviĝas aliaj civitanoj.
La solidareco, oni devas diri tion tre laŭte kaj klare, estas fiasko de la socio. Ĉiu ajn socio, kiu alvokos al solidareco estas fiaskinta en tiu tereno. Ni ne povas atenti pri la alvoko nuntempa. Oni petas solidarecon por rekonstrui, tion, kion barbara milito detruis en iuj landoj. Tio ne povas esti nomata solidareco, sed simple daŭrigo de milito fare de fremdaj potencoj. Oni devas kompreni, kio estas solidareco, ĉar en multaj kazoj oni uzas tiun vorton por konfuzi aŭ trompi la civitanojn. Ĉu vi povas imagi socion, en kiu ne troviĝus almozantoj, en kiu la riĉeco, kiun produktas la laboro estus ĝuste distribuata? Kaj leciono pri solidareco estas tio kio okazas nuntempe en nia lando. Peti solidarecon por homo, kiu perdis sian hejmon ĉar ne povis pagi sian hipotekon pro sia senlaboreco. Mi ne scias, kion vi pensas, karaj gekolegoj, sed por mi estas serioza fiasko de tiuj, kiuj okupiĝas pri la regado de la lando, kaj ne gravas, kia lando ĝi estos, nek en kia reĝimo ĝi ekzistas.
Mi ne scias, kio okazis en pasintaj tempoj kaj mi aludas al la viktimoj de genero, kiuj konstante okazas en nia lando, kie laŭdire ekzistas la nomata libero, ĉar se ni volas analizi justecon, certe devus ekzisti aliaj leĝoj. Oni petas soladirecon, kun la parencoj de la viktimoj, sed unue oni devas studi, analizi, kial okazis tiaj abemenaĵoj? Se la civitanoj havus, sufiĉan edukon, se la civitanoj estus devigataj sekvi regulojn por paca kunvivado, fakte tiuj perfortoj ne okazus. Sed ofte nome de unu libereco malbone prezentita kaj malbone obeata, ni alvenas al tiuj situacioj. Kiam la fiago estas farita, oni alvokas al solidareco kun la familianoj kaj estas vero, ke en tiu socio en kiu ni vivas la solidareco estas unu el la rimedoj, kiuj povas trankviligi la familianojn de la viktimo. Sed vi bone komprenas, ke la solidareco estas rimedo por kaŝi la malbonan edukadon kaj kunvivadon de socio malbone organizita. Mi estas solidara en tiuj okazoj, sed mi scias distingi la kaŭzojn kaj kialojn.
Kiam la solidareco ne estos bezonata, fakte ni alvenis al kunvivado ĝusta kaj justa, Eble al iuj el vi tio ŝajnus io stranga, io pri kio vi neniam pensis. Ni predikas konstante la virtojn de nia socio sed malofte vi demandas vin, kiaj estas la malvirtoj. La pasiveco "aktiva" estas unu el la kulpantoj de la solidareca ekzistado. Ankaŭ ĉiu persono povas eduki sin mem; por esti honesta kaj por ke homo sentu la veran fratecon ne estas necese iri al la lernejo. Eble la solidareco devos esti aplikata, kiam iu parenco forlasas nin por ĉiam, tiam oni devas ni troviĝi apud, la suferanta familio. Estas devigo de ĉiu homo, kiu si sentas solidara troviĝi flanken de la familio, ĉar en tiu tereno, la normoj de kunvibado establigitaj de kiu ajn reganto aŭ regantoj havas neniam influon, nek kulpas. Preskaŭ ĉiuj moralaj problemoj la solidareco estas tute necesa. Sed apliki la solidarecon pro misfaroj de la socio estas alia afero.
Mi povus meti multajn aliajn ekzemplojn por subteni mian kriterion, ke la solidareco, en la plej multaj okazoj, estas nur fiasko de la socio en kiu ni vivas nuntempe. Do, al ni restas nur starigi socion en kiu ne estos necesaj tiuj homaj bonfaroj. La akcepto de tia socio nun aperas nerealigebla, sed ni devas labori tiucele. La homaro tre evoluis rilate al la tekniko kaj la scienco, sed rilate al la homa kunvivado ni progresis ege malmulte. Pratempe la rilatoj inter la malmultaj loĝantoj ne estis bonaj, hodiaŭ malgraŭ ke la tekniko kaj la scienco metas niadispone multajn ilojn, kiuj povus agrabligi la vivon, ni troviĝas en similaj rilatoj. Daŭre la homo utiligas la homon siaprofite, kreante tiujn diferencojn, kiuj postulas la t.n. solidarecon. Mi esperas, ke estonte la homaro kapablos krei socion justan por ĉiuj kun egalaj rajtoj kaj devigoj. La tasko, ja, ne estas facila, sed ni ĉiam devas pensi al plibonigo. Vero estas ankaŭ, ke io ni progresis, sed ĉio funkcias tiom rapide, ke mi ne scias, kiom da tempo estos necesa por atingi stadion, en kiu ĉiu homo povos diri: mi estas feliĉa. Kaj en ĉi tiu planedo ni havas ĉion por ke la homaro vivu en konkordo, frateco kaj plena libero, sed por tio estas necese grandan ŝanĝn. La progreso, tiu progreso teknika kaj scienca, havas nenian valoron, se la civitanoj ĉiam kverelos por posedo de povo kaj riĉeco. Ĉiuj homaj estaĵoj estas similaj, pli belaj aŭ plimalbelaj, kun tiuj aŭ aliaj kapabloj, kiuj povas distingi unu de la alia, sed kiel membro de la homa raso, ne povas esti distingoj. Neniu persono estas pli supera ol la alia. Neniu homo povas regi la vivon de alia. Ni devas vivi en ne deviga solidareco, sed en plena apliko de homaj rajtoj, por ĉiuj egale.